# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ kesäkuu ◆ junio ◆ 3/2003



**Aŭtunaj Tagoj, p. 11 ◆ UEA en krizo, p. 3**

*Esperantolehti deziras belan someron al ĉiuj legantoj!*

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo**: 💻 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)
Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 💻 ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 15 •/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 • .

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538
Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Eldonkvanto: 400


## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritamäki*
Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 🖷 (02) 423 246 💻 anna.ritamaki@kolumbus.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**
*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697
*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326
*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎🖷 (09) 1483871 💻 jukka.noponen@iki.fi
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 💻 raitapy@jymy.kase.fi
*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 💻 tgrundstrom@www.lailanet.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*
Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 💻 eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Oficejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*
Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎🖷 (09) 275 5528
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Somero en Esperantujo – sed debata frosto en UEA

Junio. Somermeza festo. Multe da lumo. Varmo. Bela verdo. Finnlanda somero belas. Somero alvenis en la nordan parton de nia terglobo. Esperantujo vivas laŭ sia somera ritmo per kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj, sed kiel statas simbole pri nia komunuma vivo? Ĉu ni spertas someron de la movado, plenforte florantajn internaciajn kontaktojn kaj kulturajn manifestiĝojn? Ĉu somersune varma estas la etoso? Ĉu komfortiga kaj bonfartiga estas la stato de niaj aferoj?

Nu, eble vi jam divenis mian starpunkton. Eble vi jam trafoliumis la gazeton kaj trovis la vortojn de Jukka Pietiläinen pri la nuna situacio de nia ĉefa tutmonda asocio. Ŝajnas al mi ke interne de la kutimaj kadroj de Universala Esperanto-Asocio almenaŭ la debata klimato estas plenfrosta. Komforto kaj bonfarto ne estas la plej konvenaj vortoj por priskribi la nunan staton de UEA. Influas ankaŭ nin, nian asocion kaj niajn ageblecojn, se malbonfartas la Centra Oficejo, la jarlibro kaj almenaŭ kelkaj nunaj kaj eksaj oficistoj kaj oficհavantoj en UEA. Esperanto povas bone vivi sen UEA, sed pli bone nia vivo kaj ni, la uzantoj, vivas kun la daŭra subteno de tutmonda, demokratie kaj orde administrata asocio.

Momente mankas reala informinterŝanĝo sur la paĝoj de la revuo Esperanto, en la retlisto de la membroj – nuntempe kun la nomo <*uea-membroj@yahoogroups.com*>, ne plu *individuaj-membroj* – kaj en la malofte aperantaj gazetaraj komunikoj de UEA. La mildaj vortoj de la redaktoro de la revuo ne subtenas malferman debaton malgraŭ la eldiritaj vortoj pri tia celo. La trankviligcelaj vortoj de la vicprezidanto pri la laboro de la foririnta konstanta kongresa sekretario efikas banalige, kvazaŭ la kaŭzoj ne estus menciindaj, kvazaŭ ili ne estus sinceraj kaj kontribuus al pli bona kompreno pri la nuna stato de UEA.

Eventuale temas pri neintenca sufokigo de la debato. Povas esti ke centraj aktivuloj tiomagrade vivas en la interreta mondo ke ili opinias ĉiujn jam bone informitajn. En retpaĝoj kaj retlistoj oni povas legi pri la kaŭzoj de Nikola Raŝic foriri – aŭ pli bone demisii, kiel ni jam kutimas diri. Ja li ne estas la nura, kiu proteste foriras. En la oficiala organo de la asocio troviĝas nur aludo pri iaj konfliktoj en la asocio ĝenerale.

La revuo ne antaŭsupozu ke ĝiaj legantoj jam legis ĉion en *La Ondo* aŭ en la reto, ke ĉiuj jam konas la situacion kaj nur bezonas komfortigon post la ŝoko. La revuo mem devus liveri la ŝokon. Nun ĝia politiko odoras je kaŝemo. Publikigo de prilumigaj eroj de aliaj gazetoj jam kontribuus al pli freŝa odoro, sed rekta, sendependa kaj instiga informado povus enkonduki novan printempon. Ja la revuo montris ke ĝi kapablas malferme raporti pri la diskutoj en TEJO. Tio gratulindas! Pri la centro de UEA eblas same agi. Tio nur postulas plian kuraĝon.

Sur la tria paĝo de la revuo kiu ne informis pri la demisio, nur pri la foriro, troviĝas parado de fotoj. Subkomprenite tiuj fotoj montras la konfliktantojn, sed ne aperas la nomoj sub la bildoj (kvazaŭ enigme ... ja enigmojn ŝatas la nova redaktoro – sed la krucvortenigmojn mi fakte bonvenigas). Dubinda estas la personcentreco, la paradigo de suspektitoj, dum ja temas pri politika kaj struktura krizo. La agoj de tiuj personoj nur malkaŝas la dumlonge estiĝantan situacion. Aparte dubinda estas la elekto de protagonistoj en tiu parado. La eksteruloj paradu antaŭ niaj okuloj! Mankas ĉiuj centraj agantoj ▷

# UEA en profunda krizo

## Nikola Rašic demisiis

Post la demisioj de Osmo Buller kaj kelkaj aliaj oficistoj de UEA en 2001 la situacio en la Centra Oficejo restis kriza. La lasta indiko pri tio estis la demisio de Konstanta Kongresa Sekretario Nikola Rašic en aprilo 2003. Post la demisio komenciĝis vigla diskuto kaj kritiko kontraŭ la estraro de UEA kun kiu la demisiintoj ne sukcesis havi normalajn laborajn rilatojn.

Nikola Rašic diras ke li ”malkonsentas kun iuj ideoj, agoj kaj metodoj, kaj tio rilatas la asocion, denove ne personojn. Estante oficisto oni devas plenumi certan politikon, kaj tio ne eblas se vi ne konsentas pri ĝi aŭ se vi opinias ke ĝi mankas. Tio metas onin en neelteneblan pozicion kaj en certa momento oni ja foriras”. Nikola Rašic estis unu el la plej kompetentaj oficistoj de Centra Oficejo post la demisioj en 2001.

Mi proponis en la diskutlisto de UEA, ke la estraro demisiu kaj ke la komitato elektu novan estraron en la Gotenburga kongreso. En aprila kunsido de UEA estraro ”tri estraranoj anoncis pri sia preteco demisii, tamen ĉar estis konstantite, ke neniuj urĝaj problemoj per tio solviĝas, sed nur kreiĝas multegaj pliaj, oni plu laboris por trovi solvojn”.

### *Libera Folio* raportas plurflanke

Komence de aprilo komencis aperi reta gazeto, *Libera Folio*, kiun fondis eksredaktoro de *Esperanto* Istvan Ertl kaj eksestrarano Kalle Kniivilä. UEA ”trovas sin en profunda krizo” ili skribis en la unua eldono de la gazeto kaj akuzas, ke ”ŝrumpas la membraro, kadukiĝas la servoj – dume la Estraro dankas kaj gratulas, planas kaj malplanas”. Krome ili plendas, ke ”pri la nuna krizo de UEA ne skribas ties oficiala organo”. Tial necesis fondo de *Libera Folio,* kiu celas ”sobre kaj kritike prilumi aktualajn evoluojn en la Esperanto-movado.”

La gazeto ekaperis komence de aprilo, sed ĝi ne funkcias kiel tradicia gazeto kun distingeblaj numeroj. Male, ekzistas nur unu sola ”numero” kiu konstante ĝisdatiĝas kaj tiam ankaŭ ”la unua paĝo” (la unua retpaĝo) ŝanĝiĝas kaj la malnova malaperas.

---

en la nuna UEA.

Se UEA ne kuraĝas montri sian doloron ni membroj fremdiĝas. Se ni ne konas la situacion ni ne povas doni nian varmon kaj subtenon. Kiam la komitato kunsidos en Gotenburgo mi provos kontribui al pli varma klimato en UEA, honesta kaj malferma. Mi sopiras al nova printempo, al freŝa spiro, al fido pri stabila tutmonda asocio kaj ĝuoplena partopreno en ritmo de somero en Esperantujo.

*Anna Margareta Ritamäki*

## Retadreso de Esperantolehti ŝanĝiĝis

Ekde la apero de ĉi tiu numero, Esperantolehti havas novan retadreson:

***eaflehti@esperanto.fi***

La malnova adreso *esperantolehti@ esperanto.fi* funkcias ankoraŭ dum ioma tempo, sed estas bone tuj ekuzi la novan.

Komence en *Libera Folio* aperis intervjuoj kun Nikola Rašic, Osmo Buller kaj diskuto inter Trevor Steele kaj Rašic. Krome aperis komentoj de konataj esperantistoj kaj ligoj al aliaj retejoj. Ĝis la komenco de majo aperis ankaŭ opinioj de kelkaj aliaj (i.a. Mark Fettes, Claude Piron kaj Ilja de Coster) pri la afero, raportoj pri la estrara kunsido en aprilo kaj, la unuan de majo, du intervjuoj kun Renato Corsetti. La materialo, kiu amasiĝis en la reta gazeto plenumus jam kelkajn numerojn de ordinara esperanta gazeto, sed en reta formo la spacomanko ne same senteblas kiel en tradicia gazeto.

Laŭ Osmo Buller la kialo de demisioj estas ”en malĝusta kaj damaĝa sinteno de gvidaj membroj de la nuna kaj antaŭa estraro al la rolo kaj funkciado de la Centra Oficejo”. Li ankaŭ kritikas, ke ”la estraro havis en si mem bonan intencon plifortigi eksteran agadon, unuavice la informadon (...) kaj sekve ĝi direktis multe da rimedoj por ĝi je la kosto de atento kaj rimedoj al la flegado de UEA kiel organizaĵo”. Iuj estraranoj ”jam forgesis, ke plimulto de niaj membroj kaj eĉ aktivuloj plu restas ekster interreto” en sia volo virtualigi ĉion.

Renato Corsetti bedaŭras la demision de Nikola Rašic, sed ”vere ne komprenas” ĝian kaŭzon. Corsetti ankaŭ akuzas ke raŭmistoj transprenis la potencon ankaŭ en UEA, dum li mem volus havi pli da finvenkismo aŭ – kiel li preferas diri ”venkismo”. Corsetti emfazis, ke li ”ne vere interesiĝas pri UEA sed pri Esperanto” kaj ne komprenas esperantistojn, por kiuj Esperanto estas celo en si mem. Mark Fettes, eksa redaktoro de *Esperanto*, komentas, ke ”esti prezidanto de UEA ne signifas esti prezidanto de Esperantujo” kaj la prezidanto kaj estraro devus okupiĝi unuavice pri la estrado de UEA.

Surbaze de la materialoj en *Libera Folio* ne estas facile difini kio finfine kaŭzis la malkonkordon inter oficistoj kaj la estraro. Oni parolas pri diversaj laborstiloj kaj prioritatoj, sed ofte mankas konkretaj ekzemploj. Tamen unu tre konkreta ekzemplo estas la estonteco de la Centra Oficejo, sed tio problemo fariĝis almenaŭ momente neaktuala pro la malfondo de Oficeja Komisiono en la aprila estrarkunsido. Ankaŭ la prezidanto Corsetti diras, ke li ”komencas kompreni, ke neniu ŝatas la movon al Samarkando” (=malpli kosta lando) kaj ke ”tiu movo, ankaŭ se ĝi venos, venos post longa tempo.” Li tamen persone plu opinias, ke ”multaj servoj devus moviĝi al plimalmultekostaj lokoj”. Jen eble unu el la plej gravaj kialoj por demisioj, apud la megalomania agadkampo de la prezidanto.

Dum sia unua ekzistomonato *Libera Folio* estis vizitata jam preskaŭ 3000-foje kaj ĝi fariĝis unu el la plej rapidaj, multflankaj kaj interesaj informiloj pri tio, kio okazas ĉirkaŭ UEA kaj Centra Oficejo. Iom bedaŭrinde tiu ĉi fonto de informoj kaj opinioj ne estas atingebla por tiuj, kiuj ne havas aliron al Interreto. Kvankam la artikoloj estas libere represeblaj, ne estas verŝajne, ke plejparto el ili aperus en paperaj gazetoj, simple pro manko da spaco. Tamen kelkaj gazetoj, i.a. *Ondo de Esperanto* jam uzis la materialon sur siaj paĝoj.

Se oni rajtus esperi la plej pozitivan rezulton ĝi estus: *Libera Folio* kun sia nuna redakta duopo fariĝu oficiala informilo de UEA (kun ligo en la retpaĝoj de UEA) pri la internaj aferoj de UEA kies plej gravaj artikoloj aŭ iliaj resumoj aperu en revuo *Esperanto* (tamen ne pli ol unu paĝo po numero).

Momente la retejo funkcias sub la retejo de Kalle Kniivilä kaj la konstanta adreso de la gazeto estas daŭre <*http://folio.xrs.net*>.

*Jukka Pietiläinen*

# La Aganto de la Jaro, Tapio Sormunen

A-L.: Por multaj de niaj nuntempaj legantoj vi persone ne estas konata. Via laboro por esperanto estas gravega, sed por la publiko kaŝita. Vi ja prizorgis dum jardekoj membroregistron de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj de Esperanto-klubo de Helsinki, vi faras etiketojn por Esperantolehti, vi estas kasisto de Esperanto-Ligo de Finnlanda Instruistoj, kaj mi scias ke vi havis multajn aliajn okupojn en la movado dum jardekoj.

Kie vi naskiĝis, kaj kiel vi trovis esperanton?

T.S.: Mi naskiĝis en Suonenjoki kaj frekventis Komercan lernejon en Varkaus. Dum lerneja tempo havis mi unuan kontakton kun esperanto en jaro 1962-1963. Tiam aperis esperantokurso en revuo Kuluttaja ĉe E-liike. Hannes Koivu faris la kurson por la revuo.

Tiutempe ne estis aliaj esperantistoj en Suonenjoki, Varkaus kaj Kuopio. Poste mi kontaktis ĉefdelegiton Joel Vilkki kiu donis informojn kaj vendis librojn al mi. Mia unua persona kontakto okazis en Bavario, Germanio, 1968. Tiam mi komencis labori en Germanio kaj restis tie kvar jarojn.


Al Helsinki-klubo mi aliĝis aŭtune 1972 kiam mi revenis hejmen. Tiam Pentti Silander estis kasisto de EKH kaj volis lasi la postenon, kaj mi elektiĝis kiel kasisto kaj restis ĝis la jaro 1983, poste estis mi kasisto de EAF.

A-L.: Kiel aspektas nuntempa movado en viaj okuloj?

T.S.: Dum lastaj tri jaroj mi ne plu partoprenis aranĝojn, al mi ŝajnas ke estas ia stagnado, mi ne plu konas la junajn membrojn.

R.P.: Mi konas vin kiel kasiston de ELFI dum la jaroj, kiam mi estris la sekcion de ILEI. Ankaŭ mi nun deziras danki vin pro via sindonema laboro kaj gratuli vin nome de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj.

*Intervjuis Anna-Liisa Heikkinen, peris Raita Pyhälä*



***Tapio Sormunen ricevis la diplomon kaj la novan Plenan Ilustritan Vortaron lige al la estrarkunsido de EAF (12.4. 2003).*** *(Foto: Päivi Saarinen)*

# Kurslibro de astronomio en Esperanto

*David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel: La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo. Eldonintoj: Fundación Esperanto, Flandra Esperanto-Ligo. Antwerpen, 2001.*
*ISBN 90 71205 92 4*




Astronomiistoj David Galadí-Enríquez (Centro pri Astrobiologio apud Madrid, Hispanio) kaj Amri Wandel (Universitato de Jerusalem, Israelio) verkis kursolibron de astronomio en Esperanto. Ĝiaj diversaj ĉapitroj celas konsistigi tre ampleksan traktadon pri diversaj sekcioj de astronomio.

La libron komencas traktado de grandecskaloj sur la Tero kaj en la proksimaj kaj pli foraj regionoj de la universo. En aliaj ĉapitroj oni pritraktas ecojn kaj strukturojn de diversaj astroj, moviĝojn de astroj, fenomenojn de la firmamento kaj ŝiajn ŝanĝiĝojn, ecojn kaj mekanismon de astronomiaj teleskopoj kaj teoriojn de astrofiziko. En fino estas ĉapitroj pri serĉado de vivo ekster la Tero.

Ambiciaj celoj por unu libro. Klare tro ambiciaj por malgranda libro, pensas mi. En multaj kazoj la libro komencas klarigi tre bazajn aferojn kaj tro koncize progresi al astronomiaj komplikaĵoj. Diversaj partoj de la libro ne bone kongruas. Dum unuaj ĉapitroj celas ilustri la bazajn proporciojn de la Sunsistemo, la pli postaj partoj celas esti universitatnivelaj kursoj, kiuj kun sia komplika matematiko apenaŭ interesas la saman leganton. La ĉapitroj pri kondiĉoj por ekzisto de vivo kaj serĉado de vivo ekster la Tero havas iom troigitan porcion de la libro, supozeble ĉar speciala fako de unu verkinto estas ĝuste astrobiologio (esplorado de vivo ekster la Tero). Aliflanke astrobiologio, per bona kaj fundamenta traktado, povus esti jam interesa temo de alia tuta libro.

En kelkaj partoj la verkintoj ŝajne celas ilustri aĵojn, kiujn oni praktike povus mem vidi sur la ĉielo. Ili ne bone sukcesas, esence pro tio, ke la libro tute ne havas iun stelmapon. La profesiuloj ŝatas trakti aferojn per tabeloj, matematikaj ekvacioj kaj teksto, sed kion valoras ekzemple listo de la nomoj de konstelacioj, se oni havas nenian mapon? Ankaŭ la libro havas kelkajn tekstajn priskribojn de objektoj de la ĉielo, sed sen mapo ekzistas nenio instrukcio por ilin trovi. Ankaŭ la parto pri ecoj de astronomiaj teleskopoj havas nur dubindan valoron, ĉar la libro ne donas taŭgan bazon por praktike uzi teleskopon.

Ankaŭ grava manko por la libro estas fotoj. Sur la kovriloj estas tri belaj fotoj, sed krom tiuj nur kelkaj malbonkvalitaj kaj ne informdonaj. Miron vekas ankaŭ alia grafika kvalito. La ĝenerala nivelo de la desegnaĵoj estas tolerebla, se ne proksime perfektan, sed vera strangaĵo estas la manskribitaj klarigaj tekstoj en la desegnaĵoj. Certe komputila tajpado povus oferti pli klarajn tekstojn en moderna libropresado.

Se tiu ĉi estas la unua kurslibro de astronomio en Esperanto, kiel oni en la enkonduko suspektas, ĝi certe valoris esti farita. Sed la kampo de astronomia kurslibraro ankaŭ valoras plian evoluigon. Esence apartigon de diversaj flankoj de astronomio: Pli bone instigan gvidlibron por hobiastronomio; Pli ampleksan kurslibron por eventuala profesia uzo; Ĝisdetalajn librojn pri specialaj kampoj, kiel vivo ekster la Tero.

*Mikko Mäkitalo*

## Esperanta fabelkonkurso la kvaran fojon

La kultura kaj literatura centro Päätalo-instituto organizas jam por la kvara fojo fabelkonkurson en Esperanto. Temas pri speciala branĉo en la konkurso ”Napero-Finlandia”, kiun la instituto unuafoje okazigis en 1993. En 2000 oni aldonis Esperanton kiel konkursan lingvon laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä. Kiel la partoprenintoj de la pasintjaraj Aŭtunaj Tagoj de EAF scias, en tiu vilaĝo estas vigla Esperanto-agado, kies motoro estas Aini Vääräniemi.

La konkurso donas la eblecon gajni publikan atenton por Esperanto. El la vidpunkto de la Esperanto-movado tio eĉ okazas senpage. Pasintjare la konkurso donis eksterordinaran publikecon al Esperanto en Kroatio, kie la gajninto de la ĉefpremio, la 12-jara Stefani Strunjak, fariĝis tutlanda famulo. Eble io simila povos okazi ankaŭ ĉi-jare, se esperantistoj diskonigos la konkurson kaj instigos infanojn partopreni en ĝi. Päätalo-instituto principe pretas daŭrigi la tradicion de la Esperanta konkurso, sed la kondiĉo estas, ke la nombro da konkursaĵoj estos kontentiga.

Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 9-jaraj; 10-11-jaraj kaj 12-13-jaraj.

La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte.

Longeco ne estas fiksita. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. En la prijuĝado oni aprezas antaŭ ĉio fabelecon kaj originalecon.

La konkursaĵoj estu senditaj poŝte kaj alvenu plej laste la 15-an de septembro 2003 je la adreso: Päätalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando.

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

La rezultojn oni publikigos samtempe kun tiuj de la finna konkurso la 18-an de oktobro, kiam oni festas la nomtagon de Satu (nomo, kiu en la finna signifas fabelon). En ĉiu branĉo oni principe aljuĝos tri premiojn. Inter la gajnintoj de la unua premio la ĵurio elektos la laŭreaton de la ĉefpremio, Fabelo Internacia.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FIN-93590 Vanhala, Finnlando; retadreso: <*aini.vaaraniemi@pp.inet.fi*>

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en: <*www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm*>.

## Lerno-kompleto de ILEI

Nia instruista ligo pretigas lernilojn precipe por pli junaj lernantoj kaj koncentras la atenton al studiloj uzeblaj internacie, alivorte, en kiuj aperas nur Esperanto. Ili estas preparitaj laŭ la ideoj de komunika instruado, nome ke la baza lingva unuo estas la frazo, kaj oni de la komenco uzas la lingvon aktive por dialogi, komunikante ideojn kaj nociojn.

Por komencantoj, la propono estas Okuloj, 44-paĝa kolore ilustrita kajero, pretigita por infanoj inter 6- kaj 10-jaraj. Ĝi prezentas 440 radikojn, el kiuj pli ol kvardek estas verboj – la motoroj de la frazoj. Ili aperas en adekvataj kuntekstoj, tiel ke lernantoj tuj dekomence scias ne nur la verbon sed ankaŭ la uz-manieron – kun aŭ sen rekta objekto. Aperis ankaŭ Okulo Gvidilo por la instruisto aŭ kursgvidanto. Ĝi resumas por ĉiu paĝo de la studenta kajero la novajn vortojn, gramatikaĵon, komunikajn lertojn, kaj krome prezentas praktikajn konsilojn kiel prezenti la paĝon kaj kiujn pliajn agadojn aŭ ludojn oni povas uzi. La dua parto de la gvidilo prezentas fotokopipretajn ekzercojn, tiel ke instruisto povas mem tre facile pretigi task-foliojn por la klasanoj, ŝparante la tempon mem krei ilin.

Por daŭrigi la kursojn ekde la fino de la studado de ”Okulo”, ni proponas kajerojn du kaj tri

de la serio Tendaraj tagoj. Tiu transiro eblas, ĉar Okulo kovras la saman vort-trezoron kaj gramatikon kiel la unua kajero de Tendaraj Tagoj, kiu ne plu estas havebla de ILEI (sed eble restas ĉe iuj libroservoj). La dua kajero estas unuavice destinita por lernantoj inter 10- kaj 16-jaraj; gvidila materialo por ĝiaj komencaj paĝoj estas troveblaj en la hejmpaĝo de ILEI. La tria kajero de Tendaraj tagoj konvenas por ĉiuj lernantoj pli ol 10-jaraj, ĝi estas uzebla eĉ por kursoj de la supera nivelo.

Kiel aldona helpilo ni proponas grandformatan kantlibron de norvega kolego. Oni povas trovi pliajn informojn pri ĉi tiuj verkoj en la hejmpaĝo <*http://www.edukado.net*>.

Okulo, kajero 1, 44p, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.

Okulo, Gvidilo por kajero 1, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50.

Tendaraj tagoj, kajero 2, 72p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.

Tendaraj tagoj, kajero 3, 76p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90.

Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj, Jon Rommesmo, 100p. EUR 3,60.

Mendeblaj de la libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekzempleroj por Tendaraj tagoj, ĉiuj titoloj plus sendokostoj).

Mendeblaj de ILEI (Poŝte: Pannonia u. 30 I 6, HU-1136 Budapest. Rete: <*stefan.macgill@galamb.net*>), triona rabato por ĉiuj verkoj ekde 3 ekzempleroj de ajna titolo, sendokostoj inkluzivitaj.

## IJK 2004 en Rusio

Meze de majo la estraro de TEJO oficiale akceptis inviton de Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM) gastigi la 60an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Rusio (meze de julio 2004). Jam troviĝis ejo por la IJK kaj kreiĝis provizora paĝaro: <*http://www.tejo.org/rejm/ijk*>.

## LIRO-2003

La redakcio de "La Ondo de Esperanto" denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2003.

Liro-2003 havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo: ne pli ol 30 mil literojn longa

2. Originala poezio: la amplekso ne estas limigita

3. Traduka poezio el la rusa lingvo: poemoj de Fjodor Tjutĉev

4. Traduka prozo el la rusa lingvo: "Ĉelovek v futljare" de Anton Ĉeĥov

5. Traduka prozo el la angla lingvo: "The Celebrated Jumping Frog of Calaveras County" de Mark Twain

En ĉiu el la branĉoj 1, 2, 3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2003 (RU-236039 Kaliningrad, p. k. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 1a de novembro 2003.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono, aŭ rete (sezonoj@gazinter.net). Ili estas ankaŭ elŝuteblaj el nia retpaĝo <*http://Esperanto.Org/Ondo*>, rubriko "Literatura konkurso Liro", kie estas multaj informoj pri antaŭaj konkursoj.

La laŭreatoj de Liro-2003 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2003. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2005 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike.

## UEA sekvas la situacion pri UK en Pekino 2004

“Mi aŭdis, ke la UK en Pekino 2004 estis nuligita pro SARS. Anstataŭe la UK planita por 2005 en Vilnius estus ŝovita al 2004. Ĉu tio veras?” Christian Darbellay, komitatano de UEA, demandis en la retlisto UEA-membroj kaj ricevis la sekvan respondon:

La Estraro kun grandaj atento kaj zorgo sekvas la evoluon de la aferoj ligitaj kun SARS-epidemio. Ĝi certe ne riskos la sanon de la esperantistoj kiuj partoprenus kongreson en riskoplena loko. Sed kiu povus hodiaŭ profeti ĉu Pekino estos tia post pli ol unu jaro kaj ĉu tiam ne montriĝos tia eventuale alia planata loko? Aliflanke la Estraro ne volas facilanime tro frue detrui kaj senvalorigi la penon kaj entuziasmon kiun la ĉinaj esperantistoj investis en la preparadon de la kongreso.

Neniu ŝanĝo pri la UK 2004 estas decidita. La Estraro faros ĉion por decidi ne tro frue, sed ankaŭ ne tro malfrue. Tuj kiam la decido okazos, la esperantistaro estos informita de la Estraro.

*Ivo Osibov, estrarano pri kongresoj*

## Vielä ehdit Valamoon!

Valamon esperantokursseille on tähän mennessä osoittanut kiinnostusta moni henkilö, mutta ilmoittautuneita on vain pari. Jollei kurssille saada tarpeeksi osallistujia, se peruuntuu, mikä olisi vahinko: onhan se jo muodostunut kesäiseksi perinteeksi. Jyväskylän kesäkursseja järjestettiin 30 kertaa – Valamolla on nyt edessään vasta neljäs kesä. Edellisvuotiset kurssilaiset ovat innostuneesti kertoneet kokomuksistaan, he nauttivat sekä erinomaisesta opetuksesta Atilion johdolla että retkistä, yhdessäolosta, luostarin ilmapiiristä ja ihanasta kesäisestä luonnosta. Tule sinäkin tänä vuonna – ja jos mahdollista innosta tuttavasikin mukaan! Ja kerro kaikille tutuille alle 19-vuotiaille, että kurssille osallistuminen antaa hyvät mahdollisuudet päästä ilmaiselle matkalle Euroopan parlamentin kokoukseen ensi keväänä tai myöhemmin.

Atilio opettaa tänä vuonna joitakin tunteja kaikkia kurssilaisia, joten aivan aloittelijakin saa paremman tuntuman esperanton käyttämiseen ulkomaalaisen kanssa.

*Valamo ja me odotamme teitä!*
*Tiina, Carola & Atilio*
*Valamon kurssien opettajatiimi*

Ilmoittautumiset suoraan Valamoon: Valamon kansanopisto, 79850 Uusi-Valamo; puh: (017) 5701400, faksi: (017) 5701402, sähköposti: <*valamon.kansanopisto@valamo.fi*>

Lisätietoja: Tiina Oittinen, yhteystiedot s. 2 tai Carola Antskog, yhteystiedot takakannen sisäsivulla jäsenjärjestöissä: Suomen opettajien esperantoliitto.



## Valamo – ne forgesu ĝin

La kursoj de Valamo bezonas pliajn kursanojn – alie ni riskas perdi la valoran kunlaboron. La kursoj okazos nun jam la 4an fojon, do estas tradicio. Ĉi-jare kompreneble multaj el vi vojaĝos al UK en Gotenburgo, sed bonvolu klopodi laŭeble inspiri viajn gekonatulojn veni al Valamo. Vi ja memoras la entuziasmajn raportojn de pasintsomeraj kursanoj – do, certe la studsemajno en la monaĥeja atmosfero estas inda kaj multdona.

Eksterlandanoj aliĝu tra EAF, kontaktuloj: Tiina Oittinen, <*sekretario@esperanto.fi*> aŭ Carola Antskog, <*cantskog@kolumbus.fi*>.

# Aŭtunaj Tagoj de EAF en Raŭmo

## 13.-14. de septembro 2003

### *Al kvalita komunikado – lanĉo en Raŭmo*

*Laatua viestintään – lanseeraus Raumalla*

*Kvalitet i kommunikationen – lansering i Raumo*

La urbo Raŭmo ne estas nur grava havenurbo kun longa historio kaj pitoreskaj stratoj. Ĝi estas ankaŭ la urbo kie en 1980 kolektiĝis ĉ. 350 gejunuloj el pli ol 30 landoj por kune pasigi Internacian Junularan Kongreson. Dum tiu ĉi kongreso estis lanĉita la Manifesto de Raŭmo, vaste rekonata sed same vaste pridisputata dokumento en la Esperantomovado. Ĉi-jare Esperanto-Asocio de Finnlando invitas al Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo por lanĉi sian projekton Al kvalita komunikado, kiu celas levi la kvaliton de la informa agado de nia asocio.

### Alveno kaj foriro

Aŭtunaj Tagoj komenciĝos sabate per lunĉo je la 11.30 horo kaj finiĝos per posttagmeza kafo dimanĉe ĉirkaŭ la 15-a horo. Eblas mendi tranokton pere de EAF ankaŭ por la antaŭa nokto kaj konatiĝi kun la urbo dum la cent vendejoj de la malnova urbo estas malfermitaj sabate antaŭtagmeze.

### Komunikaj ideoj

La projekto Al kvalita komunikado, kiu ricevis financadon de Fondumo Esperanto, estos oficiale lanĉita. Ni konatiĝos kun ĝia strukturo kaj celoj, kun ĝia enhavo por la nuna jaro kaj malfermos pripensadon pri realigeblaj kaj realigindaj agadoj en la sekvaj jaroj. La antaŭvidita projektodaŭro estas tri jaroj.

### Ĉefpreleganto

Dafydd ap Fergus, ankaŭ konata kiel David Ferguson, kimro loĝanta en Belgujo laboranta por la Brusela Komunikadcentro (BKC) de Eŭropa Esperanto-Unio, estos nia ĉefpreleganto. Li konatigos nin kun la realaĵoj de la komunikadcentro kaj prezentos siajn strategiajn rimarkojn pri la publika bildo de la Esperantomovado. Dafydd ap Fergus eklernis Esperanton en la fino




***Estraranoj kaj organizantoj invitas al la AT-hotelo Cumulus: Päivi Saarinen, Tiina Oittinen, Paula Niinikorpi, Tuomo Grundström kaj Markku Saastamoinen inter la kunsidoj la 24an de majo 2003. Fotis (amr).***

de la 90aj jaroj. Li estas profesia ĵurnalisto kaj konata en Esperantujo interalie pro sia insista agado kontraŭ favorado de denaskaj anglalingvanoj en dunganoncoj. Ni aŭdos liajn vidpunktojn kaj prezentos aliajn.

### Rememore

Estante en Raŭmo ni ne povos preterpasi la signifon de la IJK en 1980. Ni vizitos la iaman ejon de la kongreso Rauman Yhteislyseon lukio kaj tie konatiĝos kun la okazaĵoj interalie per la televida filmo pri la kongreso (se ni sukcesos havigi ĝin). Aparte bonvenaj estas ĉiuj nostalgiuloj partoprenintaj la kongreson, kaj enlandaj kaj eksterlandaj, sed ni opinias ke por ni ĉiuj estos interese konatiĝi kun la etoso de tiu tempo.

### Konatiĝu kun Raŭmo!

Dum la semajnfino ni ankaŭ estos gvidataj laŭ stratoj kaj anguloj de la malnova urbo. Sabate vespere ni manĝos en ĉarma malnova vilao ĉe la marbordo. Ni aŭdos korusan muzikon kaj kune ludos lingvajn kaj aliajn ludojn. Proponoj por la vespera programo ankoraŭ estas akceptitaj.

### Ejoj

Nia ĉefa kunvenejo estas hotelo Cumulus, Aittakarinkatu 9 (26100 Rauma) telefono 02-837 821. La amasloĝejo troviĝas tuj apude en Rauman Lyseon peruskoulu. En la amasloĝejo estos matracoj surplanke de la gimnastikejo. Ni ankoraŭ ne decidis ĉu oferti amasloĝejon por la nokto inter vendredo kaj sabato. Interesiĝantoj pri tiu alternativo bv. anonci tion en la aliĝilo aŭ kontakti la organizantojn.

### Organizaj informoj

La aliĝilon bv. sendi al la oficejo. Praktike la aliĝilojn prizorgos Päivi Saarinen. La monon bv. pagi al la konto de EAF Sampo 800017-230825. La kotizo dependas de la dato. La VT-paketprezoj (inkluzivas manĝaĵojn kaj tranokton) havas la saman prezon sendepende de la pagodato.

**Gvidlinioj por informado pri Esperanto:** dokumento akceptita de la komitato de UEA en 2000 laŭ propono de la tiama estrarano pri informado Kalle Kniivilä. Ĝi enhavas liston de komunikaj celoj kaj difinas komunikajn rimedojn sur la niveloj de UEA, landaj asocioj, loka kaj individua.

**En la revuo Esperanto, oktobro 2000, Kalle Kniivilä skribis:**

”Por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas.”

**Komunikaj celoj**

– Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo
– Konsciigi la publikon pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto
– Proponi Esperanton kiel solvon en konkretaj situacioj
– Kuraĝigi al lernado de Esperanto

Pri la monaj aferoj prizorgas la kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

Pri la praktikaĵoj prizorgas Tiina Oittinen kaj surloke en Raŭmo Tuomo Grundström kaj Paula Niinikorpi, pri la programo ankaŭ Anna Ritamäki. La kontaktinformoj de la aktivuloj troviĝas sur paĝo 2. Vi povas konatiĝi kun la FEJO-estraranino Paula per retpoŝto *<paulaniinikorpi @hotmail.com>* aŭ telefono 040-527 4821.

Pli da informoj pri la programo kaj pri Raŭmo aperos en la sekva numero.

Bonvenon al Raŭmo! Kaj rigardu la turismajn retpaĝojn *www.rauma.fi* – ankaŭ en Esperanto!

# Suomen Esperantoliiton syyspäivät,

## Rauma 13.-14.9.2003

### *Laatua viestintään – lanseeraus Raumalla*

*Al kvalita komunikado – lanĉo en Raŭmo*
*Kvalitet i kommunikationen – lansering i Raumo*

Rauma ei ole ainoastaan vanha satamakaupunki Vanhoine Kaupunkeineen. Se on myös paikka, jossa heinäkuussa 1980 kokoontui noin 350 nuorta yli 30 maasta kansainväliseen esperantonuorten kongressiin. Tuon kongressin aikana laadittiin ja julkaistiin ns. Rauman manifesti, joka merkitsi esperantoliikkeessä uudenlaista ajattelua. Se on hyvin tunnettu ja edelleen kiistelty esperantoliikkeen linja-asiakirja. Tänä vuonna Suomen Esperantoliitto kutsuu syyspäivänsä Raumalle aloittamaan Laatua viestintään -projektia, joka tähtää liittomme tiedotustoiminnan kohentamiseen.

**Aikataulu**

Syyspäivät alkavat lauantaina lounaalla klo 11.30 ja päättyvät lähtökahviin sunnuntaina noin kello 15. Majoituksen voi tilata järjestäjien kautta jo perjantaista ja saada vapaan lauantaiaamupäivän, jolloin voi tutustua kaupunkiin ja poiketa joissakin Vanhan Rauman 180 pikkuliikkeestä.

**Ideoita viestintään**

Laatua viestintään -projekti avataan virallisesti. Sen rahoittaja on Fondumo Esperanto-säätiö. Tutustumme projektin rakenteeseen ja päämää-



***Foto: Antti Mikkola (dum la turkua-tamperea ekskurso al Raŭmo la 28an de majo 1992).***

riin, sen sisältöön kuluvana vuotena sekä avaamme suunnittelun seuraavina vuosina toteutettavista toimista. Projektin suunniteltu kesto on kolme vuotta.

## Luento-ohjelma

Pääluennoitsijamme on Dafydd ap Fergus (David Ferguson), Belgiassa asuva ja Euroopan Esperantounionin Brysselin tiedotuskeskuksessa työskentelevä walesiläinen. Hän tutustuttaa meidät keskuksen toimintaan ja esittää strategisia näkemyksiään esperantoliikkeen julkisesta kuvasta. Dafydd ap Fergus on journalisti, esperantisti 90-luvun jälkipuoliskolta. Hän on toiminut näkyvästi mm. sitä syrjintää vastaan, joka ilmenee työpaikkailmoituksissa englannin kielen syntyperäisen taidon vaatimisena. Kuulemme varmaan monenlaisia mielipiteitä.

## Muistoja

Raumalla ei voi sivuuttaa vuoden 1980 nuorisokongressia. Käymme sen tapahtumapaikalla (nykyinen Rauman Yhteislyseon lukio) ja näemme mm. kongressista tehdyn TV-filmin (jos saamme sen käsiimme). ”Olinhan siellä minäkin” -muistelijat meiltä ja maailmalta ovat erityisen tervetulleita kertaamaan itse ja kertoilemaan meille muille tuon ajan tunnelmista.

## Tutustu Raumaan!

Viikonloppuna meitä myös opastetaan Vanhan Rauman kaduilla ja kujilla. Lauantai-illan ateria ja ohjelma ovat meren rannalla vanhassa huvilassa; kuoromusiikkia, kieli- ja muita leikkejä. Ohjelmaehdotuksia otetaan vastaan.

## Tapahtumapaikka

Syyspäivien tapahtumapaikka on hotelli Cumulus, Aittakarinkatu 9 (26100 Rauma), puhelin 02-837 821. Yhteismajoitus on viereisessä Rauman Lyseon peruskoulussa, liikuntasalin lattialla patjoilla – makuupussi tai vuodevaatteet mukaan. Mahdollisuus lisäyöhön yhteismajoituksessa on vielä auki – jos olet kiinnostunut tästä, ota yhteys järjestäjiin.

## Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittautumislomake lähetetään liiton toimistoon, missä niistä käytännössä huolehtii Päivi Saarinen. Maksut maksetaan liiton pankkitilille Sampo 800017-230825. Osallistumismaksun suuruus riippuu maksupäivästä. Syyspäiväpaketti on saman hintainen riippumatta maksupäivästä ja sisältää ruokailut ja yöpymisen. Maksuihin liittyvistä asioista huolehtii Anna-Liisa Heikkinen.

Syyspäivien käytännön järjestelyistä huolehtivat Tiina Oittinen ja Raumalla Tuomo Grundström ja Paula Niinikorpi sekä ohjelmajärjestelyistä myös Anna Ritamäki. Muiden kuin Paulan yhteystiedot ovat sivulla 2 ja FEJO:n hallituksen jäseneen Paulaan voi tutustua lähettämällä sähköpostia osoitteella *<paulaniinikorpi@hotmail.com>* tai soittamalla numeroon 040-527 4821.

Lisää syyspäivien ohjelmasta ja Raumasta Esperantolehden seuraavassa numerossa!

Tervetuloa Raumalle! Ja katsokaa matkailusivuja osoitteesta *<www.rauma.fi>* – myös esperantoksi.

**Rauman manifestista:**

”Pyrimme levittämään esperantoa voidaksemme vähä vähältä yhä enemmän toteuttaa sen myönteisiä arvoja: a) tuki muulle kieltenopiskelulle – propedeuttinen merkitys; b) tavallisten ihmisten yhteydet keskenään; c) yhteydet ilman syrjintää; d) uudenlainen kansainvälinen kulttuuri. ... Näiden arvojen tiedostaminen on ehdoton edellytys sille, että me vahvistumme ja joukkoomme liittyy uutta väkeä.”

# Estraro kunvenis

La estraro kunvenis la 12an de aprilo 2003 je 12.05-16.00 en la oficejo en Helsinko. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Jukka Noponen, Päivi Saarinen kaj Markku Saastamoinen, vicestrarano Eero Rinta-Karjanmaa kaj dum la trakto de la financoj kaj de la oficejaj aferoj ankaŭ la kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

En la komenco la estraranoj iniciate de la prezidanto diskutis pri bonaj kaj plibonigeblaj aferoj de EAF. Pozitivaĵoj estis i.a. la oficejo kaj la fakto, ke ĝenerale la bazaj aferoj estas en ordo. Tre nova pozitiva afero estas la ĵus komencinta informa projekto Al kvalita komunikado kaj la financa subteno de la Fondumo Esperanto-säätiö. En ĉiuj niveloj estas manko de aktivuloj kaj ni devus restiri la membroevoluon en pozitivan direkton.

Antaŭ la kunsido Tapio Sormunen, Aganto de la jaro 2002 kaj de jardekoj, ricevis sian premion. La estraro diskutis kun li pri diversaj aferoj, i.a. kiel daŭrigi la prizorgadon de la membroregistro. (Poste montriĝis ke Taneli Huuskonen pretas ekprizorgi la registron post la apero de tiu ĉi sekva gazeto, kies adresojn ankoraŭ prizorgis Tapio.)

Konklude pri Vintraj Tagoj en Lahti la estraro konstatis ke ĉeestis entute 64 partoprenantoj (de ili 5 infanoj) kaj ke ni estas tre kontentaj pri la ejo, Lahden kansanopisto. La lokaj gazetoj kaj loka radiostacio ricevis informojn pri VT, sed verŝajne tro malfrue, ĉar laŭ nia scio nenio aperis. Esperanto-klubo de Lahti donacis al la asocio reen kvin EAF-standardojn.

Kiel plian sciigon la estraro notis ke la ĵaza muzikisto Alex Tuomarila nomis unu de siaj muzikaĵoj Esperanto en sia kompaktdisko “02” (nolla kaksi, nulo du).

La estraro elektis (aŭ konstatis la antaŭan elekton) la sekvajn funkciulojn, komisiitojn kaj reprezentantojn de la asocio:

Jura konsilanto: Sakari Kauppinen

Estraro de fonduso Propra Ejo: Sakari Kaup-

## ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 13.-14.9.2003.

Nomo

____________________

Adreso

____________________

Tel./Fakso/Ret-adreso

____________________

**Aliĝkotizo:**

❑ 12 e ĝis la 15.7.2003 ________

❑ 16 e ĝis la 25.8.2003 ________

❑ 20 e ekde la 25.8.2003 ________

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

**AT-paketoj:**

La kunvena paketo 13.-14.9.
(tranokto, 2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

❑ 72 e hotelo Cumulus 2-lita ĉambro ________

❑ 92 e hotelo Cumulus 1-lita ĉambro ________

❑ 48 e amasloĝejo ________

❑ 45 e nur manĝopaketo
(2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) ________

Kroma tranokto 12.-13.9.

❑ 30 e hotelo Cumulus 2-lita ĉambro ________

Pri kroma tranokto en amasloĝejo aŭ en 1-lita ĉambro en hotelo Cumulus, bv. kontakti la organizantojn.

**Entute** pagenda al la konto de EAF ________

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn:

____________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

BONVENON!

## ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Syyspäiville 13.-14.9.2003.

Nimi

______________________________

Osoite

______________________________

Puh./fax/sähköposti

______________________________

**Osallistumismaksu:**

- ❑ 12 e 15.7.2003 saakka ________
- ❑ 16 e 25.8.2003 saakka ________
- ❑ 20 e 25.8.2003 jälkeen ________

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**AT-paketit:**

Kokouspaketti 13.-14.9.
(majoitus, 2 lounasta, 2 kahvia, iltapala)

- ❑ 72 e hotelli Cumulus 2 h. huone ________
- ❑ 92 e hotelli Cumulus 1 h. huone ________
- ❑ 48 e koulumajoitus ________

❑ 45 e vain ruokailut
(2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) ________

Lisäyö 12.-13.9.
❑ 30 e hotelli Cumulus 2 h. huone ________

Mikäli olet kiinnostunut lisäyöstä koulumajoituksessa tai 1 hengen huoneessa hotelli Cumuluksessa, ota yhteyttä tapahtuman järjestäjiin.

**Yhteensä** maksettava EAF:n tilille ________

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen:

______________________________

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825.

TERVETULOA!

pinen (EAF), Harri Laine, Irma Heikkilä (la du lastaj devas esti reelektitaj en 2004). La prezidanto kontaktos la grupon.

Doma kompanio Siltasaarenkatu 15: Anna-Liisa Heikkinen

Oficeja biblioteko: Ritva Sabelli kun helpo de Anna-Liisa Heikkinen

Membroregistro kaj adresaro: Tapio Sormunen (kun baldaŭa transdono)

Interreto: EAF: Päivi Saarinen (kunordiganto), Jukka Pietiläinen (prizorganto), Jukka Noponen (kunlaboranto); EKH: Sakari Kauppinen; FEJO: Patrik Austin

Estraro de junulara fonduso: Anna Ritamäki kun Päivi Saarinen kiel anstataŭanto de EAF, verŝajne daŭre Hanna Helén de FEJO.

Stipendioj: Päivi Saarinen

Instruado kaj lernomaterilo, kontaktoj kun ELFI: Tiina Oittinen

Valamo-grupo: Tiina Oittinen (kunordiganto), Carola Antskog (ELFI), Sylvia Hämäläinen, Jukka Laaksonen kaj Synnöve Mynttinen

Movada historio de Finnlando: Anna Ritamäki, Jukka Pietiläinen kaj formiĝonta grupo

Nordia kunlabora komisiono: Anna Ritamäki

Eŭropa agado, komitatano de EEU: Anna Ritamäki, anstataŭanto Carola Antskog

Prelegvojaĝoj (turneoj): Tiina Oittinen

Suomen YK-liitto (UN-asocio de Finnlando): Anna Ritamäki

Vortara grupo: Jouko Lindstedt (ĉefredaktoro), Osmo Buller, Riitta Hämäläinen, Harri Laine, Raita Pyhälä (redaktoroj por vortaj artikoloj). EAF-kontaktulo kun la grupo: Anna Ritamäki

Redakta grupo de Esperantolehti: Anna Ritamäki, Riitta Hämäläinen, Raita Pyhälä, Jukka Laaksonen, Jukka Noponen (Muut lehdet), Tiina Oittinen (sekretario de EAF), Ilkka Santtila (teknika redaktoro). FEJO-helpantoj: Mikko Mäkitalo kaj Katja Lampinen, observantoj Päivi Saarinen kaj Jukka Pietiläinen. Ĉefredaktoro daŭre estas serĉata.

La estraro konstatis kiujn regularojn kaj kon-

silarojn la asocio havas kaj pritraktis la skizon por kontrakto inter Esperantoklubo de Helsinko kaj EAF pri uzo de la oficejo. La estraro petis al Päivi Saarinen kaj Anna-Liisa Heikkinen fari priskribon pri la nuna praktiko de la oficeja uzo. Poste ni faros novan proponon, kiun ni pli volonte nomos konsilaro aŭ instrukcioj (toimintaohjeet anstataŭ sopimus).

EAF subskribis kontraktojn pri uzorajto (tekijänoikeussopimukset) kun la membroj de la vortara grupo: Kun eventualaj novaj grupanoj apartaj kontraktoj devas esti faritaj. Tiuj vortaranoj, kiuj deziris, ricevis laŭ interkonsento la novan PIV. Pri eventualaj kromaj vortaroj oni devas interkonsenti aparte.

La estraro konstatis kun ĝojo la akcepton de la subvencipeto por la projekto Al kvalita komunikado. (La projekta grupo kunsidis la saman tagon, post la estrarkunsido.)

La estraro pritraktis la staton de la planoj por la somera kurso en Valamo kaj Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo kaj decidis okazigi Vintrajn Tagojn 2004 en Jyväskylä. La unua registrita Esperanto-societo en Finnlando estis fondita en Jyväskylä 13.5.1903 kaj oficiale registrita en 1904.

EAF pagis al UEA la membrokotizojn en marto kaj la estraro decidis ke ni pagu la membrokotizon al EEU por 2003 jam baldaŭ post la kunsido. La kasisto estis rajtigita transĝiri parton de la mono en la uzokonto de EAF al pli profita bankkonto.

EAF mendis kaj ricevis tri ekzemplerojn de la disko kun la simfonio n-ro 1 La Esperanta komponita de s-ro David Gaines. Lige al tiu disko venis propono de Anna-Liisa Ali-Simola: ĉiuj membrosocietoj de EAF donacu la diskon al finnlandaj radiostacioj samtempe kiel Ago-Tago-aranĝon. La estraro konstatis ke EAF pretas pagi la kostojn por la realigo de la propono (diskomendoj, poŝtigado, telefonado k.s.) se troviĝas personoj pretaj pluevoluigi kaj realigi la proponon. La estraro esperas ke la iniciatinto mem pretos esti kunordiganto. La prezidanto, kiu estas la kontaktpersono de la estraro, estu ĉiam informita pri la evoluoj.

La prezidanto planis partopreni (kaj fakte partoprenis) la kunsidon de la UN-asocio de Finnlando la 28-an de aprilo 2003 en Helsinki.

La sekva kunsido estis fiksita por la 24-an de majo 2003 en Raŭmo. (amr)

# Eventokalendaro de EAF

### 2003

14-18.7. Kursoj en Valamo (esperantokurssit, esperantokurser) (Valamon kansanopisto)

19-26.7. Internacia Junulara Kongreso en Lesjöförs, Svedio (TEJO)

27.7.-2.8. Universala Kongreso en Gotenburgo, Svedio (UEA)

29-31.8. Mazi I, kurso por komencantoj (alkeiskurssi, nybörjarkurs), Kimito (ELFI)

13-14.9. Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo

4-5.10. Aktivula seminario en Jyväskylä (EAF: Al kvalita komunikado)

### 2004

13-14.3.2004 Vintraj Tagoj en Jyväskylä

5-9.7.2004 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

10-17.7.2004 IJK apud Kovrov, Ruslando (TEJO)

24.-31.7.2004 UK en Pekino, Ĉinio (UEA)

septembro: Aŭtunaj Tagoj (ĝisnunaj ideoj: ekskurso al Lesjöfors, Iisalmi)

### 2005

februaro/marto: VT (ie en Finnlando)

somero: 25-jara jubileo de la IJK en Raŭmo (ideo por internacia evento)

23-30.7.2005 UK en Vilniuso, Litovio (UEA)

# Al kvalita komunikado

**EAF-projekto por levi la kvalitan nivelon de la informa agado**

(finne: Laatua viestintään, svede: Kvalitet i kommunikation)

En la pasinta numero ni prezentis la projekton *Al kvalita komunikado*. Nun vi ricevos pliajn detalojn. Sub la titolo Projektpriskribo kaj celoj aperas la tuta tiutema teksto de la projektopeto. (Pasintnumere aperis nur resumo de tiu parto.) La teksto priskribas pli konkrete la enhavon de niaj agadoj kadre de *Al kvalita komunikado*. Eĉ pli konkreta estas la buĝeto, kiun ni ankaŭ aperigas kiel tuton. Ni esperas ke la komunikada projekto de EAF instigos ankaŭ vin kunagadi.

La projekta grupo malmulton povos mem plenumi, sed ni pretas kunordigi formiĝon de aliaj grupoj, kiuj okupiĝas pri diversaj agadoj kadre de la projekto. Se nur eble proponu ne nur agadon, sed ankaŭ plenumantojn kaj detaligu la financajn rimedojn bezonatajn. Informu nin pri spertuloj pri la temoj menciitaj en la projektpriskribo kaj buĝeto! Eble vi mem povus kontribui al iu specifa projektero per viaj spertoj!

Indas atenti ke ni en la unua fazo de la projekto prioritatas la fortigon de la informa strukturo: superrigardajn kaj ordigajn agadojn. Tial ni ne povas doni multajn fortojn al ekstera informado, kvankam ankaŭ tiaj agadoj povas esti jam ĉi-jare realigataj.

Lokaj asocifortigaj agadoj povas enkadriĝi en tiu ĉi fazo de *Al kvalita komunikado*. Metu la projekton sur la tagordon de via klubo aŭ grupo kaj komuniku al ni viajn bezonojn! (Uzu la retliston EAF-agadas – pli precizaj informoj pri la listo ĉe la prezidanto – aŭ sendu viajn proponojn por *Al kvalita komunikado* je la oficeja adreso! Evidente vi estas ankaŭ bonvena diskuti viajn ideojn kun la anoj de la projekta grupo.)

Memoru ke *Al kvalita komunikado* nur estas la kadro. La veran enhavon ni kreos kune! Ni pensu kaj agu kreive por kune produkti pli kvalitan asocian agadon!

Kelkaj elementoj de la agadoj menciitaj en la projektpriskribo jam konkretiĝis:

1) **La projekta grupo** kunsidis trifoje post la akceptiĝo de la peto, la 12an de aprilo, la 11an kaj la 24an de majo; la lasta kunsido al kiu la tuta estraro estis invitita okazis en Raŭmo, la du unuaj en Helsinko.

2) Estrarano Markku Saastamoinen partoprenis en trejntago pri uzo de la jarmilaj celoj de UN kadre de la studsistemo **Mondcivitana maturecekzameno de la UN-asocio de Finnlando** en Jämsä 20.5.

3) La prezidanto partoprenos kiel reprezentanto de EAF en la **Unesko-konferenco pri interkultura edukado en Jyväskylä 15-18.6.**

4) Ĝisdatigita baza informilo **Esperanto tänään** verŝajne jam estas preta, legebla interrete kaj multobligita, kiam vi legas tiun ĉi gazeton; ĉiuj membroasocioj ricevos aŭtomate kelkajn ekzemplerojn kaj ankaŭ aliaj povas peti ekzemplerojn de ĝi senpage de la oficejo.

5) Al Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo 13-14.9. venos **Dafydd ap Fergus de la Brusela Komunikadcentro**.

6) Ni okazigos **trejnseminarion por aktivuloj en Jyväskylä 4-5.10**; ĉiuj membroasocioj povos sendi reprezentantojn kaj ankaŭ unuopaj aktivuloj povos partopreni.

## Projektpriskribo kaj celoj

Ni deziras dum la trijara projektoperiodo krei informan strukturon, kiu povas funkcii kiel fundamenton por longdaŭra agado. Paralele kun la strukturaj laboroj, kiuj inkluzivas trejnadon de la membroj, ni faros konkretan informan laboron al elektitaj celgrupoj kaj al la ĝenerala publiko pere de elektronika kaj surpa-

pera informmaterialo, amaskomunikilaj kontaktoj kaj ĉeesto en diversaj eventoj.

Temas pri tri ĉefaj agadoj realigataj paralele:

1) INFORMA STRUKTURO. Superrigarda kaj sistemiga laboro, kiu celas krei bazon por analizo de la stato de nia informa agado kaj sekve konduki al informa strategio de nia asocio.

– inventario de niaj ekzistantaj rimedoj (kiuj informiloj ekzistas, kiuj aliaj rimedoj kiel ekz. ekzistantaj videofilmoj, televidaj programoj, sonkasedoj, interretaj paĝoj, kiel statas pri la oficejo kaj biblioteko en kunteksto de informado, kiel pri homfortoj, scioj...)

– analizo de niaj nunaj rimedoj kun laŭbezona konsultado de fakuloj

– surbaze de informplano efikigo de la eluzo de la ekzistantaj rimedoj, plibonigo de ekzistantaj rimedoj kaj enkonduko de novaj

– ellaboro de manlibro pri informado

2) TREJNADO DE LA MEMBRARO. Konscia agado por trejni niajn membrojn pri informa agado kaj por pliklerigi ilin pri la diversaj facetoj de la fenomeno Esperanto vastasence.

– invito de spertuloj al membraj eventoj

– trakto de temoj gravaj por plibonigi la informan laboron en Esperanta Finnlando

– okazigo de seminarioj por aktivuloj

– partopreno en konferencoj kaj trejnaj eventoj okazigitaj de aliaj organizaĵoj, kaj de esperantistaj kaj de aliaj

3) INFORMA LABORO. Kontribuo al pli vasta rekono de la valoroj de Esperanto kaj al pli bona ĝenerala nivelo de scioj pri nia lingvo en Finnlando.

– kontaktoj kun amaskomunikiloj

– partopreno en eventoj por informi pri la fenomeno Esperanto

– disvastigo de informiloj

– evoluigo de la retpaĝoj

Ni taksas ke la projektogrupo devas kunsidi 4-6-foje dum la unua projektofazo (februaro 2003 ĝis marto 2004). Temas unuavice pri plankunsidoj por strukturigi la informan agadon kaj evoluigi la projekton, sed ankaŭ por plani konkretajn agadojn.

Ni celas inviti eksterlandan fakulon al Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo, verŝajne por prezenti kaj diskutigi la dokumenton *Gvidlinioj por informado* akceptitan de la komitato de UEA en 2000. Per tio ni volas malfermi vastan kaj sisteman perspektivon al informado en nia asocio.

Dum semajnfino post la Aŭtunaj Tagoj ni celas okazigi trejn- kaj laborseminarion por aktivuloj. Tie ni relevos la temojn de la informa seminario de EAF okazigita en Jyväskylä en novembro 1999. Tiun seminarion partoprenis 13 aktivuloj kaj sekve de ĝi estis verkita informplano, kiu estis nur parte realigita (aperis la informilo *Rakastu esperantoksi*). La plano havas analizon de bezonoj kaj por rimedi tiujn necesas inspiri kaj envolvigi homojn por realigi la bezonatajn agadojn. Dum la trejnseminario ni ankaŭ pliprofundigos la temojn levitajn dum Aŭtunaj Tagoj.

Dum la unua fazo ni ankaŭ vastigos nian bibliotekon per materialo utila por informado kaj kuraĝigos niajn anojn partopreni en trejnaj eventoj de aliaj organizaĵoj. Krome ni strebas doni ioman financan subtenon por prelegoj kaj aliaj prezentiĝoj pri Esperanto.

La dua fazo estos detale planita dum la jaro, la tria fazo skize planita. Momente ni antaŭvidas evoluigojn de la samaj ideoj, okazigon de du poraktivulaj seminarioj jare kaj kulminon de projekto en la lasta jaro interalie per eldono de manlibro pri informado kaj okazigo de alekstera kampanjo kaj evento. Tiu evento povus eventuale rilati al lingvopolitiko, interkultura komunikado aŭ/kaj internacikulturaj manifestiĝoj.

Dum la tuta projektoperiodo ni strebos ankaŭ atenti la eblecojn kunlabori kun aliaj esperanto-organizaĵoj, interalie kun Universala Esperanto-Asocio kun kies laborplano *Al lingva demokratio* nia projekto bone kongruas, kun la Brusela Komunikadcentro de EEU, kiu servas kiel informpunkto pri lingvopolitikaj temoj kaj kunordigas informajn agadojn en Eŭropo kaj kun la aliaj landaj asocioj de UEA en Nordio. Speciale ni celas atenti la evoluojn en la junulara movado kaj nutri kontaktojn kun la grupo E@I (Esperanto ĉe Interreto).

Ekster-Esperantujaj kunlaborpartneroj povas esti ekz. la Päätalo-instituto, la UN-asocio, Popola instituto de Valamo (jamaj proksimaj partneroj), la junulara konsilio Allianssi, la reto kontraŭ rasismo ENAR kaj la fako pri interkultura edukado en la universitato de Jyväskylä.

# Buĝeto

## *Al kvalita komunikado*

*EAF-projekto por levi la kvalitan nivelon de la informa agado*

### Unua fazo februaro 2003 - marto 2004

**Kunvenoj de la projekta grupo** kaj invititaj fakuloj (vojaĝkostoj, manĝokostoj, iufojaj tranoktokostoj), kvin kunsidoj kun averaĝa kosto po 500 e: **2500 e**

**Komunikadaj kostoj** de la projekta grupo (telefonaj, retpoŝtaj, poŝtaj): **400 e**

**Partopreno** (aktivuloj de EAF inkluzive de membroasocioj) en eventoj de aliaj organizaĵoj, trejnaj eventoj por lerni pli pri informado kaj prezentiĝaj eventoj por prezenti la lingvon aŭ alian flankon de nia agado (vojaĝkostoj, kotizoj): **600 e**

**Vastigo de la oficeja biblioteko** per konsultlibroj kaj aliaj eldonaĵoj, tiel ke ni havas bonan informan bibliotekon (kaj la haveblaj esperantlingvaj gvidlibroj kaj nacilingvaj libroj pri gazetaraj kontaktoj, varbado kaj informado ĝenerale): **300 e**

**Informaj dissendoj** por aktivuloj kaj por eksteraj celgrupoj (paperoj, multobligado ekz. de nova *Esperanto tänään* -informilo, komputila inko, poŝtmarkoj): **600 e**

**Invito de spertulo pri informado** (verŝajne persono kiu kapablas analizi nian nunan informmaterialon interesoveke surbaze de la gvidlinioj pri informado adoptitaj de UEA) por Aŭtunaj Tagoj de EAF en Raŭmo (vojaĝo, tranoktaj kaj manĝaj kostoj): **600 e**

**Okazigo de informa seminario** kiel postsekvan agadon de Aŭtunaj Tagoj por aktivuloj (plena repago de vojaĝkostoj por ĉ. 20 personoj, laŭ eblecoj kun subvenciitaj seminariaj kostoj): **2500 e**

**Kostoj por la unua fazo: 7500 e**

### Dua fazo marto 2004 - marto 2005

Daŭrigo de la agadoj de la antaŭa jaro, okazigo de du poraktivulaj seminarioj. La dua fazo estos detale planita dum la nuna jaro. Ni antaŭvidas ke la kostoj estos similgrandaj kiel dum la unua fazo.

**Kostoj por la dua fazo: 7500 e**

### Tria fazo marto-decembro 2005

Daŭrigo de la agadoj de la antaŭa jaro kaj kulmino de projekto interalie per eldono de manlibro pri informado kaj okazigo de alekstera kampanjo kaj evento. Ni antaŭvidas ke la kostoj estos iom pli grandaj en la lasta projektojaro.

**Kostoj por la tria fazo: 10 000 e**

**Buĝettakso por la tuta projektperiodo sume: 25 000 e**

# Biblioteko – Novakiroj

*Lernolibroj:*

Esperanto en dialogoj. Andrzej Pettyn. Warsawa 1990. 419 p.

Esperanto keele öpik. J. Ojalo. Tallinn 1973. 135 p.

*Noveloj:*

La dekopo de Afke. Nynke van Hictum. Leeuwarden 1974. 92 p.

La gaja forĝisto. Herman Schmid. Augsburg 1976. 24 (humuro)

Katoj kaj ĉevaloj. Adalberto Huleŝ. Budapest. 1982. 80 p.

Kumeuaua la filo de la ĝangalo. Tibor Sekelj. Antverpeno 1979. 94 p.

Malriĉaj homoj. Zsigmond Moricz. Budapest 1979. 36 p.

La Normandaj rakontoj de Guy Maupassant. Stockholm 1953. 211 p.

Penetre tra jarcentoj. Kazimjeĵ Ŝczurek. Tartu 1971. 68 p.

Sur la vivopado. Nicolino Rossi. Milano 1980. 111 p.

Verkoj de Verda Majo. Ĉina Esperanto-Eldonejo 1982. 501 p.

Viro en nigra mantelo kaj aliaj rakontoj. Barbara Sokalowna. Varsovio 1984. 96 p.

*Poezio:*

Libero kaj amo. Poemoj elektitaj. Sándor Petöfi. 1970. 260 p.

De tempo al Tempo. Giorgio Silfer. Kuopio-Milano 1977. 85 p.

*Romanoj:*

Danai Vrajla. romano. Despina Patrinu. Ateno. 129 p.

Moderna kroata prozo. Zagreb 1979. 606 p.

# Nordiaj tagoj en Salo

La suno brilis super la korto de la urbodomo kiam alvenis la gastoj de la nordiaj ĝemelurboj de Salo la 22an de majo. Inter la svedoj estis tri reprezentantoj de la esperantoklubo en Katrineholm, invititaj de la klubo en Salo. La gastojn Bertil Nilsson, Agneta Emanuelsson kaj Anita Bergh bonvenigis Anna, Carola, Matti, Liisa kaj Eero.

Liisa prizorgis la loĝadon de la gastoj kaj Matti aranĝis por ili saŭnovesperon vendrede. Ĉiuj kune festis Nordian vesperon kiel gastoj de la urbo sabate. Entute preskaŭ 200 personoj el la ĝemelurboj Katrineholm, Odder kaj Vennesla vizitis la urbon. Ili estis gastoj de iom pli ol dek organizoj kaj kompreneble ankaŭ de la urbo mem.

Jam estas invito por la nordiaj tagoj en la dana Odder 13-16.5.2004 kaj oni serĉas esperantistojn tie. Kelkaj jam estas konataj sed se iu el vi havas konatulojn tie aŭ en la norvega Vennesla ni estas dankaj se vi interkontaktigos nin.

*Esperantoklubo de Salo/Carola Antskog*



***Gastoj kaj gastigantoj sur la korto de la urbodomo en Salo la 22an de majo.*** *(Fotis: Anna Franzén, la sekretario pri kulturo en Salo)*

# Vizito de Hertta Kalkas en la kunsido de EST

S-rino Hertta Kalkas, multjara flegistino de Vilho Setälä, vizitis la 31-an de marto 2003 la kongreslandan kunsidon de Esperanto-societo en Turku. Ŝi rakontis vive pri sia longdaŭra vivo kaj multflanka labora kariero. Ŝi estis inter la pioniroj en la esplorado de flegsistemoj en Finnlando kaj doktoriĝis en la jaro 1981. Pri Vilho Setälä ŝi rakontis varme kaj diris, ke ilia rilato estis unika: ambaŭ havis ŝian propran flankon, kiun la alia respektis. Kiel ni scias Esperanto estis gravega por Vilho, sed Hertta siaflanke tute ne lernis la lingvon.

S-rino Kalkas donacis al EAF kaj EST kelkajn fotojn fotitajn de Setälä kaj same kelkajn lernolibrojn kaj Kanteletar, kiuj apartenis al Setälä.

*Raportis Tiina Oittinen*



**Hertta Kalkas rigardas la bildojn dum la kunveno de EST.** *(fotis A-L Ali-Simola)*



**Maldekstre: Laŭ informoj de Hertta Kalkas en la bildo estas Vilho Setälä kiel juna viro.** *(fotisto ne konata).*

# Muzea ekskurso de Esperanto-societo en Turku (EST)

La 6an de majo, 2003 grupo de EST-anoj kolektiĝis ĉe la restoracio Pinella apud la malnova urbocentro de Turku. Tie la grupo estis fotita. Poste ni piediris laŭ la orienta flanko de la rivero Aura kaj kune rigardis la hejmurbajn vidindaĵojn, kiuj ja abundas en nia kara urbo. Nia celo estis la muzeo de Wäinö Aaltonen, kie Leena Tiusanen kaj Tiina Oittinen ĉiĉeronis en la ekspozicio pri Tove Jansson. Antaŭ la muzea vizito EST-anoj admiris la poemon de Wäinö Aaltonen, kiu estas hakita en la muzean muron en 10 lingvoj – plej laste venis Esperanto 1995, ĵus antaŭ la antaŭkongreso de la 80a UK en Turku.

Somere EST-anoj kolektiĝas jene: la 18an de junio je 16.30 en kafejo de Stockmann, la 12an de julio je 16.00 sur korto de restoracio Koulu kaj la 13an de aŭgusto je 16.30 denove en kafejo de Stockmann. La diskutrondo studanta la libron de B. Kolker daŭrigas ekde la leciono 22 la 27an de aŭgusto je 16.30 en kafejo de Stockmann. Bonvenon ankaŭ vizitantoj en ĉiuj tiuj kunvenetoj!

*Tiina Oittinen*




***Ekskursantoj de maldekstre Kerttu Ekman, Tuuli Åkerman, Tiina Oittinen, Mari Vaalto, Veikko Tikkanen, Riitta Ojanen kaj Anja Launiainen. Malantaŭ la fotilo estis Anna-Liisa Ali-Simola.***

# Mia unua okazaĵo

Mia granda espero estis ĉiam: Iun tagon mi vojaĝos eksterlanden, en okazaĵon, ĉar mi volos vidi eksterlandajn esperantistojn.

Nun mi estis tie kaj mi estas feliĉa, ĉar mia deziro realiĝis. Koran dankon al ĉiuj homoj, kiuj laboris kaj helpis min (speciale al vi, Katja Lampinen).

**Kaj nun, iom pri mia vojaĝo....**

En merkredomatene mi estis tre ekscita. Ĉar mi sciis, ke ĉi tio estis mia unua vojaĝo el Finnlando, al eksterlando ... sola. Tia estis penso, kiu vekiĝis en mia menso, ĉe la flughaveno de Helsinki-Vantaa. Mi rigardis mian brakhorloĝon, ĉirkaŭ unu kaj duonhoron da tempo, nun eniri!

Aviadilo funkciigis la motorojn. Mi sidis ĉe la fenestro kaj rigardis kiam la domoj fariĝis tre-ege malgrandaj. Baldaŭ domoj malaperis kaj tra la fenestro mi vidis grandan mapon sub la aviadilo. Baldaŭ la mapo malaperis, ĉar aviadilo flugis super la nubojn. Ĉirkaŭ du horojn post mia ekiro el Helsinko, mi vidis flughavenon de München. La aviadilo surteriĝis tien.

Nun mi havis unu kaj kvaronan horon da tempo ŝanĝi la aviadilon. Al aviadilo, kiu flugis el München al Genova, Italio.

Tio estis iom diferenca flugo, ĉar mi flugis kun helicaviadilo trans la Alpojn. Alpoj, granda montaro. Tio estas bela vidaĵo. Grandaj montoj kun naĝosuproj. Estis por mi la unua fojo, kiam mi vidis la Alpojn. Post unu horo kaj kvardek minutoj mi vidis la flughavenon de Genova sub mi. Aviadilo surteriĝis tien. ”Knabo, nun mi estas en Italio” mi pensis tiam. Nun mi devis trovi la stacidomon de Genova.

Mi estis ŝvitema, ĉar mi havis tro multe da vestoj, estis konvena kvanto en Helsinko, sed malkonvena en Genova. Mi provis forgesi tion kaj vojaĝi al Savona.

Mi trovis la stacidomon de Genova kaj mi vojaĝis el Genova al Savona per trajno. En la stacidomo de Savona mi demandis de funkci-

ulo: ”Kie kuŝas ĉi tiu loko? De kie ekiros aŭtobuso?” kaj montris adreson al li. “Tio estas alte sur la montaro. Aŭtobuso ne iras tien.” estis lia respondo al mi. Sed samtempe mi ekvidis knabinon, ŝi havis pecon da papero. Sur la papero estis la sama adreso kiun mi serĉis. Ŝi havis la saman problemon kiel mi, nun mi ne estis sola.

Jes, ni ekiris promenante kaj serĉis kune la lokon de festivalo. Ŝi montris pecon da papero kaj demandis de aliaj homoj: ”Kie kuŝas...?” Sed fine ni trovis korektan vojon. Tie estis interesa trafiksignalo, dudek procentojn kruta deklivo kaj longeco de ĉirkaŭ 2000 metroj. Mi pensis, ke tre bone... Mi havis plu tro multe da vestoj.

### Je la celo

Tie estis bela vidaĵo al la centro de Savona kaj al la maro. Se mi rigardis suben, mi vidis malgrandajn domojn kaj la Mediteraneon, ĉar la loko de la festivalo estis en deklivo de monto.

Mi trovis seĝon, mi sidis ĉirkaŭ unu horon kaj rigardadis ĉar mi estis iom laca. Longa vojaĝo el Helsinki al Savona laŭ mia opinio. Sed mi estis feliĉa, mi kapablis fari la vojaĝon sola. Mi vidis multe da homojn. Multaj estis el Italio, kompreneble, kaj multaj el eksterlandoj. Tie mi estis homo el eksterlando.

Ĉiun tagon estis lecionoj pri apartaj temoj, ekzemple malmallonga kurso de itala. Miaopinie ĉirkaŭ kvar horoj estas malmulte da tempo lerni novan lingvon. Post lecionoj ni havis liberan tempon. Kaj en la vespero (ĉiun vesperon) post la ”vesperpasta” – en Italio, homoj manĝas fortan manĝon ĉirkaŭ la oka vespere – estas bonaj kaj amuzaj programoj.

Ni havis du ekskursojn. Unue, ni vojaĝis kaj konatiĝis kun la urbo Genova. Tie estis interesa “malnova urbo”. Altaj domoj kaj multe da mallarĝaj vojetoj. Due, ni vizitis groton. Ĝi estis treege interesa groto. Kiam mi estis knabo, mi vidis fotojn en mia lernlibro pri simila groto. Tiam mi pensis, ke mi kelkfoje povus iri kaj vidi similan groton... Nun mi vidis. Finne la groto estas “TIPPUKIVILUOLA”.

La vojaĝo al Italio estis bona kaj amuza. Mi konatiĝis kun Esperantistoj el eksterlandoj. Unu semajno estas mallonga tempo. Sed dum tiu semajno mi lernis ke: Lingvo de Esperanto ne estas nur lingvo, tio estas multe pli....

*Timo Pirinen, reprezentanto de FEJO (dua reprezentanto estis Patrik Austin, la prezidanto de FEJO)*




***Du barbaroj (Gunter Neue kaj Timo Pirinen).***

## Korespondi deziras


52-jara instruisto en faklernejo por gelernantoj kun mensa difekto; kapitano de jakto, volas trovi amikon por velnavigado. Wieslaw Michalak, Lublin, Pollando, retadreso <*monivies@poczta.onet.pl*>.

## Korespondi deziras


Deziras korespondi kaj amikiĝi kun finnaj esperantistinoj por interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn, poŝajn kalendaretojn. Dominique Sebillotte, 49 rue de la Premiere Armee, F-68190 Ensisheim, France.

# Pratempaj amuzoj

Uusi sarja jatkuu! Hupia ja hyviä muistoja menneiltä FEJO-vuosilta.
koonnut: Katja Lampinen




FEJO-bulteno 2/87



Kvinpinto 4/87





FEJO-bulteno 3/88




FEJO-bulteno 3/89

FEJO-bulteno 3/89



# La ministra lingvoscio

Finnlando havas novan kabineton, “ruĝ-human”. Nun interalie pri la lingvoscio de la ministroj oni skribas en gazetoj. Oni diras, ke la scio eblus esti pli altnivela kaj pli varia. Angla lingvo estas la forta lingvo de la kabineto. Pli ol duono de la ministroj parolas la anglan bone aŭ almenaŭ modere. Unu triono ne havas demonstrojn pri la lingvoscio post la lerneja studado. La sveda lingvo de multaj ministroj lamas.

La plej scianta koncerne lingvojn estas la ministro de la aferoj eksterlandaj, kiu daŭras laboron en la sama posteno, kiun li havis en la antaŭa ministraro. Krom finnan kaj svedan li parolas anglan, francan kaj germanan lingvojn kaj li studadas estonan kaj portugalan. Mirigas kial la rusa lingvo ne interesas lin. Ruslando ja estas nia plej granda kaj plej grava najbaro. Nur unu ministro, la plej juna, en la tuta registaro parolas la rusan lingvon.

Lingvoscio eble ne estas la plej grava eco aŭ kvalito de ministro sed tamen grava. Tion gravegas nia EU-membreco. Ĉiuspezaj internaciaj kontaktoj estas ege gravaj. Malfacîle estas okupi nur kun interpreto. La lunĉodiskutoj de la ministrokonsilantaroj okazas angle, france, germane aŭ itale. Krom tio Finnlando estos la prezidanta lando de EU dum la dua duono de la jaro 2006.

La ĉefministro ŝajne plibonigas sian anglan intervizitante kun la usona ambasadoro. Ĉar ŝi frue vivis en Orientbotnio kaj nuntempe en Helsinki, ŝia sveda lingvo povas esti sufiĉe bona. Alian lingvon ŝi ne parolas. Registaro inkluzivas du svedlingve denaskaj ministroj.

Kun la aliĝo de novaj EU-kandidatoj la multdiverso de lingvoj kreskas. Samtempe kreskas la bezono de komuna lingvo. La elspezoj de traduklaboro estas enormaj. La grandaj EU-landoj ofertas siajn lingvojn kiel komuna lingvo. Tio estas maljusta. La angla lingvo konkeras Eŭropon, sed eĉ la angla ne estas la plej bona komuna lingvo. Finfine ĝi estas ege malfacîla lingvo por majstri suverene. Tion oni povas vidi kiam oni rigardas la oficanoncojn de EU. Unu kondiĉo estas: angle denaska.

La unusola kaj justa solvo estas la sendependa internacia lingvo – kiel Esperanto. Zamenhof donis la utilan kaj eĉ belan lingvon por la homaro, sed ŝajnas, ke ĝi ne taŭgas. – Fakte laŭ mi eĉ la evoluo de Esperanto estas stagnita. Oni bezonas radikalajn novajn viziojn.

*Bruno Lehtinen*



# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@esperanto.fi* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@pp.phnet.fi
- Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla 💻 matti.wallius@pp.inet.fi
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, 💻 lauliu@sci.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. 💻 cantskog@ kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 • sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 •. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro** 2003

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 4 | 1.7 | 15.7 | 1.8 |
| 5 | 1.9 | 15.9 | 1.10 |
| 6 | 1.11 | 15.11 | 1.12 |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

| Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 • | 1/1 sivu/paĝo 50 • |
| 1/2 sivua/paĝo 60 • | 1/2 sivua/paĝo 30 • |
| 1/4 sivua/paĝo 40 • | 1/4 sivua/paĝo 20 • |

------------------

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

**Esperantolehden yhteyskortti**

Lahjatilaus _ / _ _ alkaen.
Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

___

___

___

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _.
(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.
(Osoitetarra kortin alaosaan)
Uusi osoitteeni on:

___

___

___

Kestotilaus _ / _ _ alkaen.
Tilaus _ / _ _ alkaen.

Tilaajan, kestotilaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

___

___

___

**Posti-merkki**

**Suomen esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65**
**00530 Helsinki**

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuun alussa. Jutut 15.7.2003 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2003 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2003**